



# Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO  
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

JARABONO

P. BABIN

Le Haut des Bourrelières  
17, rue Romain-Rolland  
85100 Le Château-d'Olonne

P.Č.K Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la blaton de niaj perantoj sur paĝo 4)

1999 - 3 - 4

JUNIO - DECEMBRO

# Niaj perantoj

**Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

**Belgio** : Libro vendejo Kariljono, vzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

**Britujo** : Les Hartridge, 74 Devonshire way, Croydon CRO 8 BS (10 pundoj)

**Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

**Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

**Germanio** : A. Rudolf, Dochsbergstr. 1, D. 34225 BAUNATAL pĉk Frankfurt / M (2759 35 - 609)

**Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

**Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

**Japanio** : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-

**Jugoslavio** : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

**Nederlando** : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

**Nov-Zelando** : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

**Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

**Portugalio** : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ (2.800 esk.).

**Svedujo** : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

**Svislando** : Esperanto Perkorponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.).

**Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

**Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



## KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitanj

### Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;  
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;  
Por ĝin praktiki por interaŝango de ideoj ;  
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;  
Por studi specialajn problemojn ;  
Por inter amikoj gaje libertempi ;  
Por ekskursi tra cent-rokoidenta Francujo.

## VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :  
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 02-41-89-10-34

# EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



| DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO                                                                                                    |                             |
|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-----------------------------|
| Direktoro :<br>H. MICARD, Prezidento de la Kulturdomo de Franclandoj Esperantistoj<br>EPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tel. 1 - (Francujo) |                             |
| JARABONO :                                                                                                                              |                             |
| Simpla : 5 N. Fkoj                                                                                                                      | Sendotaj al : Micard Henri  |
| Subtena : 5 N. Fkoj                                                                                                                     | Kulturaj kajeroj            |
| Bonfara : 10 N. Fkoj                                                                                                                    | Epineux-le-Seguin (Mayenne) |
|                                                                                                                                         | C. C. P. Nantes 2549 52     |
| ~~~~~ (Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4) ~~~~~                                                                                |                             |
| 1960                                                                                                                                    | JANUARO - FEBRUARO          |
|                                                                                                                                         | 1                           |

... en 1960 naski ĝis "Kulturaj Kajeroj"

# KULTURAJ KAJEROJ

## TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

### REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT  
26bis, rue de Milngavie  
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN  
17, rue Romain Rolland  
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

### EL GRESILLON

#### ENHAVO

#### paĝo

|                         |       |
|-------------------------|-------|
| El Grésillon            | 1     |
| Esperanto tra la Mondo  | 2     |
| Ĝis                     | 3     |
| Vortoj de Akademiano    | 4     |
| Kiel resti juna         | 5-6   |
| Esperanta Koboldo       | 7-8   |
| Zigzage laŭ Fantazio    | 9-10  |
| Pli bone "per" ol "pri" | 11    |
| Duonfolio de papero     | 12    |
| Nia posteularo          | 13    |
| Por via Distro          | 14    |
| Sekvo de paĝo 1         | 15-16 |

ĜENERALA KUNVENO je 31-a de OKTOBRO 1999

ĜENERALA EKSTERORDINARA KUNVENO: Je la 10a horo, por malfermo de la Eksterordinara Kunveno, oni konstatas, ke la kvorumo (duono de la membraro) ne estas atingita. Post nombrado de la ĉeestantaj kaj de la reprezentataj membroj, ni povas malfermi Ordinaran Ĝeneralan Kunvenon.

ORDINARA ĜENERALA KUNVENO: Malfermo je la 11a. Membraro ĉ. 860. Kvorumo 143. Membroj ĉeestantaj: 31; reprezentataj: 163; Totalo: 194: la kvorumo estas atingita. La ordinara kunveno povas okazi. Tagprezidanto: F. Boyet; protokolanto: G. Lagrange.

I- Evoluo de la membraro kaj de la Socia Kapitalo (rap. D. Babin): Nuligo de 22 nomoj. Transdono de 33 "sociaj partoj" (ne "akcioj") al la ĝenerala kooperativa kapitalo. Intertempe J. Vincent ricevis novajn membriĝojn, kiuj estas aldonataj. Temas pri 16 personoj (ne ĉiuj estas novaj membroj) kaj pliaj "Kooperativaj Partoj". Ĉu nova membro ricevas oficialan Membro-Karton? Nur pag-atestilon: li iĝas kooperanto.

(Oni notu, ke estas preferinde ne paroli pri "akcioj", kio estas erariga, sed pri "Sociaj Partoj" de la Kooperativa Kapitalo).

II- a) Modifo de la Artikolo 11a de la statuto: ATENTU:: estas gramatika eraro en la prezentado de la nova teksto. Oni legu: "... Ĝi distribuas la taskojn inter siaj membroj" (ne la membroj de la Asocio!)

Unue stariĝas la demando: "ĉu tiu nova aranĝo estas laŭleĝa?" J. Ripoché (Le Mans) petis ĉe la prefektejo: respondo neklara: "jes" sed devas esti persona respondeculo por la financo (ĉekoj) kaj por civila respondeco.(?!). En la nuna situacio la Statuto mencias, ke estas kasisto kaj fakte oni disdonas la taskojn.

D. Babin: "Kiu respondecu pri la "Socia Kooperativa Kapitalo"? La respondo de la prefektejo koncernas la "Societojn 1901". Ni estas "Kooperativo laŭ leĝo 1917". Leĝo kaduka. Situacio ne tre klara. Ĉu reveni al "Societo 1901"?

# ESPERANTO TRA LA MONDO

**KONGRESOJ kaj FESTIVALOJ** - La 84a Universala Kongreso de esperanto okazis en Berlino, de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto kun 2712 partoprenantoj el 66 landoj. Jam aktive prepariĝas la 85a, kiu okazos en Tel Aviv, de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2000. La antaŭ-kaj post-kongresoj celos la turismajn vidindaĵojn de la najbaraj landoj, Egiptio kaj Jordanio. La temo de la kongreso: "Lingvo kaj kulturo de paco" kongruas kun la temo de la kampanjo de UN kaj UNESKO por la jaro 2000.

- Al la kongreso de SAT, en Karlovy Vary (Ĉeĥio) aliĝis 178 esperantistoj el 27 landoj.

- Proksimume 500 partoprenantoj venis en Veszprem por la junulara internacia kongreso (09/16/08). La kongreso 2000 prepariĝas en Hong-Kong (05/12/08)

Por la proksima jaro oni ankaŭ interalie anoncas: -Kultura Arta Festivalo de Esperanto en Toulouse, (05/09/07)

-Kultura Esperanto-Festivalo, 17/23/07, en Nurmijarvi, Finnlando.

-Eŭropa Kongreso en Oostende, 27/04 - 01/05.

Eŭropa Esperanto-Festivalo en Budapeŝto, 11/22/08.

- SAT-Amikara kongreso en Fouquières-lez-Lens, 22/24/04

- Internacia Fervoja Kongreso, en Budapeŝto, 13/19/05.

**EN INTERNET** - Al tiu tre interesa agado de Internacia Ligo de Esperantistaj Edukistoj (ILEI) jam aliĝis pluraj dekoj da lernejoj de la tuta mondo. La projekto celas kontribui al interkultura edukado de lernantoj de diversaj geografiaj regionoj, kiuj partoprenos komunajn serĉojn formante preskaŭ virtualan lernejon. Universitata komitato zorgas pri la disvolviĝo de la afero kaj la respondeculo de la projekto estas: prof. La Torre, via Castro Pretorio, IT-00185 Roma.

**ĈE LA EDUKISTOJ** - En Francio, GEE (nova franclingva nomo: Groupe des Enseignants Esperantophones) reaktivis. La prezidanto de la provizora komitato estas S-ro Joseph Catil, 5, rue des Calabres, 69330 Meyzieu; petu de li la necesajn informojn.

**EN AZIO** - 460 homoj el 16 landoj partoprenis la Duan Azian Kongreson en Hanojo. La vicprezidento de Vietnamio, s-ro Nguyen Manh Can alparolis la kongresantojn dum la solena inaŭguro. Televido, radio kaj gazetaroj kontentige raportis pri la kongreso kaj nun oni atendas favoran sekvon por la vietnama movado.

-Dum la konferenco de neregistraj asocioj, kiu okazis en Seulo en oktobro, laŭ iniciato de UEA, laborgrupo diskutis pri la temo "Lingvoj kaj homaj rajtoj" kaj adoptis rezolucion por la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj.

**INTERESAJ ELDONAĴOJ** - "Al lingva demokratio" (en tri lingvoj). Aktoj de la Nitobe-Simpozio de internaciaj organizaĵoj. Artikoloj pri lingva politiko.

"Pajleroj kaj stoploj" de William Auld kaj Marjorie Boulton, kiuj estas 75jaraj. 24 prilingvaj artikoloj de konataj esperantistoj.

"Maigret hezitas" de Georges Simenon en traduko de Daniel Luez.

"Aŭstralia Felix" Novelaro de la bonega esperantista verkisto Trevor Steele.

Vidbendo pri la Universala Kongreso en Montpellier. (Franca aŭ esperanta lingvo.)

Nova kompakta disko de la bonega grupo Kajto: "Masko".

"Noveloj el antikva Ĉinio". Sub formo de bindita libro, nova parto de la ĉina klasika literaturo en esperanto.

"Kemia internacia vortaro"; "Historio pri nomigo de kemiaj elementoj"; "Logiko en kemia nomenklaturado". Tri libretoj de Jan W. Pioro.

"Hejma vortaro" de J. Lindstedt 600 nomoj de "ĉiutagaj aferoj".

"Alico en Mirlando". Traduko de la mondfama libreto de Lewis Carroll, farita de Dona'd Broadribb.

"Faŭsto" (partoj I kaj II) Sukcesinta versara traduko de la verko de Goethe.

## LIBRO-SERVO

La nova katalogo (2000) de la diversaj haveblaj libroj aperis. Petu ĝin:

J. VINCENT, 26bis rue de Milngavie

49150- BAUGE

# ĜIS!

## Kulturaj Kajeroj kaj antaŭuloj

Milito ne detruas nur urbojn kaj homojn. La 2-a Mondmilito sufokis ankaŭ aspirojn. Malaperis esperoj kaj projektoj... almenaŭ provizore, ĉar sub la ruinaĵoj daŭre varmetis flametoj, atende. Atendante la finon de la koŝmaro kelkaj homoj drolotis la flametojn.

1945, la milito ĉesas. Tuj la flametoj reviviĝas en la koroj dank'al la blovetoj de kelkaj idealistoj baldaŭ helpataj de pliaj spiroj. Ĉirkaŭ la revivanta varmo rekonstruiĝis homgrupoj pretaj forgesigi aspekton de la neniigaj jaroj. GEE (grupo de la esperantistaj edukistoj) estis unu el tiuj asocioj. Tre vigla antaŭ la milito ĝi malaperis ek de 1940, kaj kelkaj el ĝiaj gvidantoj estis persekutataj, eĉ deportitaj. Post kvarjara "travintrado", jam en decembro 1945, renaskiĝis la revuo "Esperanto Lernejo". GEE denove aktivis, organizis somerajn staĝojn en tre malfavoraj cirkonstancoj. Kiam la sekretario, organizanto de la "Somera Lernejo", Henri Micard proponis aĉeton de bieno, kie akcepti tiun staĝon, kvankam kelkaj dubis pri la realigebleco de la projekto, la estraro de GEE subtenis la sekretario. En 1951 estis kreita la kooperativa asocio "Maison Culturelle des Esperantistes Français", la pli multo el la membroj kaj estraranoj estis GEE-anoj.

En 1952, "Esperanto Lernejo" fariĝis "Esperanto et Culture", kiu en 1956 estis samtempe "revuo de GEE" kaj "Internacia Pedagogia revuo". Sed en 1957 la kunvivado de GEE kaj la Kulturdomo fariĝis malfacila kaj kvar estraranoj de GEE preferis dediĉi siajn fortojn al la gvidado de la Kulturdomo Grésillon.

Ek de januaro 1958 la "Maison Culturelle" eldonis sian propran revuon, "Les Cahiers de Grésillon", kiu informis pri la vivo en Grésillon. En 1959 estis decidite transformi "Les Cahiers de Grésillon" en pli kulturalan revuon, kiu informos ne nur pri la vivo de la asocio sed aperigos tekstojn de prelegoj faritaj en Grésillon kaj kulturajn diverstemajn artikolojn. La celo estis duobla: starigi ligilon inter la Kulturdomo kaj la ĉeestintoj de staĝoj, kaj proponi al la legantoj interesajn legaĵojn. Tiel naskiĝis "Kulturaj Kajeroj". Respondecis pri la eldonado J. Vincent, J.P. Guillot, S. Guillot

kaj P. Babin. Kelkaj aliaj geamikoj helpis per regula sendado de artikoloj. La presadon kaj sendadon prizorgis profesio.

En 1985, pro grava altigo de la prezo de la papero, de la presado kaj de la sendokostoj, la kaso de la revuo ne sukcesis ekvilibriĝi; la Kulturdomo devis pagi la deficiton. Prezentiĝis alternativo: aŭ ne plu aperigi la revuon aŭ trovi malplikostan manieron daŭrigi la eldonadon. Pro la insistado de fidelaj abonantoj estis elektita la dua solvo. Estis aĉetita fotokopiilo, kiu utilis ankaŭ por la multobligado de kunvokiĝiloj kaj informiloj. Nur la kovertojn estis profesie presitaj. P. Babin zorgis pri la kolektado de artikoloj, tajpado, enpaĝigo, presado, aĝrafado, sendado, helpata de familianoj. J. Vincent atente revizis kaj korektis la tekstojn antaŭ la presado. S. Guillot, ĝis sia morto, verkis aŭ tradukis interesajn artikolojn. Tiamaniere ekvilibriĝis la financoj de la revuo, senprofite sed ankaŭ sendeficite.

Venis nun la tempo por la redaktantoj rezigni pro la aĝo. Neniu sin proponis por pluvivigi "Kulturaj Kajeroj"-n Tio estas granda bedaŭro de tiuj, kiuj ĝis nun prizorgis ĝin. La abonantoj bonvolu pardoni ilin pri tiu fortranĉo de la fadeneto, kiu ligis ilin reciproke. Sed ni tamen esperu! La titolo ankoraŭ ekzistas kaj, eble, nova skipo decidis preni sur siajn ŝultrojn tiun laboron kelkfoje pezan sed plej ofte agrablan, riĉigan, fonto de grandaj plezuroj.

LA REDAKCIA KOMITATO



## LIBERO KAJ OBEO

Delfi DALMAŬ ( 1960 )

Mi ne pensas nun pri libero kaj obeo en religio, socio aŭ politiko, sed rilate al vortoj kaj frazoj, al lingvo: parolado kaj literaturo. Ĉu mi, vi, ili havas liberon esprimi per originalaj lingveroj aŭ devas obei, uzi la lernitajn aŭ registritajn en lernolibroj kaj vortaroj?

Eĉ lernante fremdan nacian lingvon, ofte oni havas la falsan ideon, ke oni povas fari, kunmeti frazojn laŭ vortoj kaj gramatikaj reguloj. Kaj, ekzemple, hispanoj kaj angloj laŭ tia lernado de la franca lingvo salutis per " Comment êtes vous " - "Como estas usted" - " How are you ". Kaj en esperanto: "kiel vi estas". Anstataŭ respektive, per " Comment allez vous " kaj "kiel vi fartas ". Italoj kaj germanoj dirus: "Kiel iras al vi" - "Como le va" - "Wie Geht es Ihnen." Tio signifas, ke oni devas lerni precipe frazojn, ĉar en ili estas samtempe la gramatiko kaj la vortoj vivantaj, la sintakso kaj la semantiko.

Neniu granda lingvo ekzistis se ĉiuj oratoroj kaj verkistoj estus kredintaj, ke ili devas obei la estintojn kaj ne havas la liberon esprimi laŭbezzone, laŭ imperativo de la sentoj kaj pensoj, ke ili devas resti en la limoj de la antaŭa esprimado. Sed nur speciale naturdotitaj lingvuloj povas kreadi; la aliaj povas nur fuŝi se ili volas krei; ili povas, devas obei, nur imiti.

Zamenhof malfermis multajn pordojn al la libero post sia strikta Fundamento. Li montris al kreokapablaj la vojon al kreado; li komprenis, ke la Fundamento estas bazo por natura lingvo kaj ne simpla kodo. Li ne estus uzinta "dank'al" kaj multajn neologismojn, se li ne pensus aŭ sentus, ke vivanta lingvo bezonas tian eblecon. La eminenta verkisto Joaquim Ruyra, plej ŝatata stilisto de la moderna kataluna literaturo, lernis esperanton antaŭ 50 jaroj, sed ne ĝis la intimeco vidi tian Zamenhofan liberigon, kaj li opiniis, ke nia internacia lingvo ne estas sufiĉe elasta, riĉigebla por ĉia esprimado. Jen kion ni devas kompreni al verkistoj.

Do, kara leganto, se ni ne profunde lernis esperanton, se ni ankoraŭ ne sentas ĝian lingvan spiriton, kaj se ni ne estas ankaŭ poetoj, ni devas obei, uzi la oficialan lingvon, la jam kreitajn lingverojn, kiuj feliĉe estas nun supersufiĉaj por nia bezono, se ni ilin lernis! Ni devas obei.

## KONTRAŬ NACIIISMOJ

Unuatempe, Esperanto estis uzata preskaŭ nur skribe. Niaj personaj interrilatoj funkciis ĉefe per poŝtkartoj kaj leteroj. Ni ankaŭ legis gazetojn kaj librojn; ni praktikis la pasivan lingvon vide. Sed Zamenhof ĉiam rekomendis, ke ni ankaŭ parolu ĝin eĉ se inter nacie samlingvaj samideanoj, ĉar tia praktikado plej efike vivigas la lingvon.

Nuntempe ĉiam pli ofte okazas esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj de nacie malsamlingvaj gesamideanoj. Tial ni devas pretiĝi, kapabliĝi por interparola uzado de nia lingvo, ni devas pli kaj pli dece, t.e. internacie, ĝin paroli kaj prononci malpliigante la influon de niaj naciaj kutimoj. La angloj per "we", la francoj per "oui", la kastiloj per "fui" montras, kiel ili diftongigas la vokal-kombinon "ui" elparolante ĝin "ŭi". La katalunoj, kontraŭe, ĝin prononcas "uj": "cuina" : "kujna". Ni devas atenti, ke en esperanto ĉiu vokalo estas forta, ĉiu memstara, aparte silabas kaj tial "situi" estas trisilaba kaj "iu" dusilaba. En multaj lingvoj "i" kaj "u" estas nomataj malfortaj vokaloj, kiuj funkcias kiel konsonantoj: respektive "j" kaj "ŭ", eĉ se oni ilin nomas duonvokaloj aŭ duonkonsonantoj; sed en nia lingvo ili estas fortaj, kiel universale fortaj "a, e, o". Kaj se "teatraĵo" kaj "teoremo" estas kvarsilabaj, ankaŭ "februaro, posteulo, dialogo, idioto" havas kvar silabojn. Jen alia ekzemplo: rimarku la diferencon inter la unua "e" de la germanaj vortoj "essen kaj lesen", antaŭ la senvoĉa "ss" ĝi estas mallonga kaj antaŭ la voĉa "s" longa; en esperanto ni devas same elparoli "e" ĉe "meso kaj mezo" En la angla "ilive" havas mallongan "i" kaj "leave" longan "i" por "ea".

Mil ekzemploj povas montri la influon de ĉiu nacia lingvo kontraŭ la deca pro-



# Kiel resti juna ?

(Resumo de prelegoj faritaj de  
de Sino Roose el Brugge,  
en la Esperantista Kulturdomo — Julio 1964)

La statistikoj montras, ke la homoj iĝas pli aĝaj. Antaŭ ankoraŭ ne unu kaj duona jarcento la meza vivdaŭro de la homo estis la duono de la nuna. La kaŭzo de tiu fenomeno estas la progreso de la medicino kaj de la higieno. Sed tiu ĝojiga fakto ankaŭ estigis novan problemon: kiaj estos tiuj jaroj, kiujn oni vivos plu? Imagu la tempon de la maljuna aĝo kun malsanoj, kun paralizitaj korpomembroj, kun ne plu klara menso. Imagu, ke en tiu lasta vivo-periodo oni estas ŝarĝo por hejmanoj. Kia malĝojiga antaŭvido!

Multaj kuracistoj komencis pensi pri tio kaj ekestis nova scienco: geriatrico. Notu bone, ke estas eraro klopodi por plijuniĝi. Tio estas neeble. La maljuniĝo estas normala evoluo. Oni devas strebadi al la mal-rapidigo de la procezo de maljuniĝo, do, resti kiel eble plej longtempe vigla, eleganta, bonfarta, ktp. Mia celo estas montri, ke oni fakte povas malrapidigi tiun procezon de maljuniĝo. La ĉefaj kondiĉoj estas volo, kaj iom frua lernado (plejlaste ĉirkaŭ la 40-a jaro). La rimedo konsistas el multaj sed malgrandaj aferoj.

Oni devas ja fari distingon inter korpa kaj spirita vigeleco. Pri tiu lasta mi nun ne volas insisti. Cetero ĝi tre malsimilas de persono al persono. Grava afero estas, ke oni konservu interesiĝon en la evoluo de la vivo kaj de la okazantaĵoj. Tial oni devas daŭre legi gazetojn; ne tiom pro la rakontado de la murdoj kaj akcidentoj, kiom pro la diversaj artaj kaj sciencaj kronikoj, pro la decidoj de ekonomiaj, politikaj kaj administraj instancoj. Oni legu plu librojn, ĉu informajn, ĉu literaturajn. Ili rivelas al ni la kaŝitan psikan evoluon de nia tempo, de

nia homaro. La pliaĝuloj ne apartigu sin de la socio; ilia interesiĝo restu vigla kaj diversflanka; ili kapablu ankoraŭ juĝi, tiel ke iliaj konsiloj restu valoraj.

Por konservi korpan vigelecon oni malhelpu la dikiĝon. Oni devas resti sana. Tio signifas ne nur kontraŭbatali malsanojn sed ankaŭ prevente zorgi, ekz. per vizitoj al kuracisto. Nu, la dikiĝo estas danĝera. Ne pensu, ke ĝi estas normala. Ekzistas kompreneble patologia dikiĝo. Sed alia formo de dikiĝo estas evitebla. Ĝiaj kaŭzoj estas preskaŭ ĉiam tromanĝado kaj tro-trinkado. Je certa aĝo oni nur tre escepte povas profiti dolĉaĵojn kaj abundan manĝon de pastoj, pano, terpomoj. La manĝado de fruktoj kaj legomoj povas ĉiam okazi en iom granda kvanto. Mi ne povas tion pritrakti detale tie-ĉi; sed troa manĝado kaŭzas amasiĝon de tro da grasoj, kaj tiuj malhelpas la sangofluon. El tio sekvas ne bona funkciado de koro kaj pulmoj, kiuj devas fari kromlaboron. Ni ankaŭ ne forgesu ke la sango devas, ĝis la plej ekstremaj partoj de la korpo, alporti la fortigajn substancojn. Ĉu estas necese insisti pri la aspekto de dikiĝinta persono? La ĝenerala fleksebleco foriris; ankaŭ la svelteco; la teniĝo ŝanĝiĝis, ktp.

Por konservi sian korpon sana oni devas konservi ĝin pura. Estas necese lavi sin tre ofte pro du kialoj: la haŭto spiras kaj tra ĝi foriras malutilaj materialoj. Kaj per broso oni devas purigi sian korpon! Pli la lavado helpas ankaŭ la sangofluon, kiu estas plej grava. Pro samaj motivoj estas bone naĝi, duŝi sin, ktp. Ankaŭ ne neglekti la zorgojn pri la ungoj de manoj kaj piedoj. La sekvoj de malzorgoj

tiurilate estas sufiĉe evidentaj.

Principo devas esti, ke nur estas permesataj tiaj vestaĵoj, kiaj subtenas la membrojn kaj organojn, ne tiaj, kiaj premas ilin. Tiuj kiuj superfluigas aŭ eĉ malhelpas la laboron de la muskoloj estas kondamnendaj. Nepre! Do, for la korseto, kiu estas kiraso. Certe nun multaj faras al si sekrete la demandon: "kion fari por kaŝi mian iom dikan ventron?" La respondo estas: "Ĝusta nutrado kaj ekzercoj." Grava estas ankaŭ la portado de facilaj ŝuoj por via teniĝo, via irmaniero, ktp. nenion porti, kio ŝnuras kolon kaj brakojn aŭ krurojn.

La tuta korpo kaj ĉiuj muskoloj bezonas ĉiutagan laboron kaj moviĝon. Terkaj aliaj laboristoj ofte pensas, ke ilia korpo estas en sufiĉa moviĝo. Tion pensas preskaŭ ĉiuj dommastrinoj, kiuj ja devas balai, froti, lavi. Tamen plejparte estas nur parto de la korpo aŭ de la muskoloj, kiu laboras, ne ĉiuj. Tial adekvataj sportoj estas necesaj, adaptitaj al la persono, kaj sub kontrolo. Mi jam aŭdas vin: "Por tio mi ne havas tempon". Ankaŭ por tio vi havas tempon se vi vere volas kaj se vi estas konvinkita pri la neceso. Klopodu trovi geamikojn, kiuj deziras kun vi regule praktiki iun sporton. Ĉambrogimnastiko estas ankaŭ tre rekomendinda. Sed vi ne sufiĉe pripensas, ke via ĉiutaga vivo donas al vi tiom da eblecoj por resti moviĝanta kaj vigla persono. De tempo al tempo kuru anstataŭ iri. Dancu iomete, kiam vi aŭdas belan muzikon ĉe la radio. Iru foje per saltetantaj paŝoj. Kiam vi supreniras ne uzu la manrelon. Kiam vi devas ion preni de la grundo genufleksu. Prenu pilkon ĵetu kaj kaptu ĝin. Prenu necesan objekton per manoj malantaŭ la dorso kaj turnu la kapon por observi kion vi faras. Ekzistas mi ne scias kiom da tiaj okazoj. Ĉiuj helpas.

## Vortoj de Akademiano

noncado de esperanto. Ordinare, tia influo ne malpermesas la esperantistaran interkompreniĝon. Tamen, ni devas iom post iom ĝin eviti, ne nur por pli facila interkompreniĝo, sed por atingi mezan, unuecan universalan esperanton, tiel ĉe verkado, kiel ankaŭ ĉe parolado

Nuntempe ekzistas ne nur legaĵoj por nia perfektigado sed ankaŭ diskoj kaj sonbendoj, krom la internaciaj kunvenoj, por nia aŭda kaj parola lernado. Ni ja devas ĉiel lerni kaj ellerni la internacian lingvon.

Ni bezonas proteinojn, kiuj estas la konstruistoj de la korpo. Ili estas la solaj materioj, kiuj donas al la organismo la nitrogenon necesan por la asimilado. Ili posedas ankaŭ amino-acidojn, kiujn la organismo mem ne kapablas produkti. Do, oni devas preni ilin de ekstere per la nutraĵoj. En normala nutrado oni ĉiutage bezonas po 60 gramojn da proteinoj. Due, bezonas karbohidratojn, kiuj donas la energion. Trie ni bezonas grasojn, kiuj protektas kaj enordigas la varmon de la korpo. Ni bezonas ankaŭ mineralajn salojn kaj akvon. Fine, sed ne laste, tre gravas la vitaminoj. Precipe la vitamino C estas nepre neceso por la formado de la ostoj, dentoj kaj ĉefe kontraŭ infekcioj. El manko da ili rezultas malpliigo de korpa kaj intelekta efiko. Bedaŭrinde oni tro ofte mortigas ilin per bolado de nutraĵoj. Feliĉe la fruktoj provizas nin per ili kaj oni ne povas preni tro da ili. Veraj fontoj estas la citronoj kaj oranĝoj. Pri la nutrado ekzistas multegaj kaj facile kompreneblaj eldonaĵoj. Espereble via scivolemo estas vekita.

Oni devas pretigi sin por tiu venonta periodo de maljuniĝo. Tiam oni estas pli trankvila kaj bonhumora. La vivo ŝajnas kaj ŝajnos pli valora kaj pli vivinda. Ĉio tio ne estas garantio, ke la maljunaĝo estos feliĉa. Sed oni pli multigas la ŝancojn de feliĉa maljunaĝo. Tro multaj personoj ankoraŭ ne komprenas tion. Ni ankoraŭ ofte devas prediki en dezerto. Sed mi ne dubas, ke almenaŭ vi, legantoj, komprenas la necesecon resti kiel eble plej longtempe junaj, agrablaj, belaj, sveltaj, ankaŭ por viaj ĉirkaŭantoj, kaj valoraj kaj signifoplenaj eĉ en relative alta aĝo.

Ĉiokaze, ni rimarkigis nur du prozodiajn makulojn kontraŭ pura supernacia esperanto: diftongadon kaj longecon de vokaloj. Sed ekzistas miloj da tiaj eraretoj en la senfina fonetiko de nia lingvo, kiujn ni devas forigi. Kaj ne nur en la fonetiko sed en la tuta gramatiko. Tamen la miraklo de esperanto havigis al ni iam grandajn oratorojn, poetojn, verkistojn el plej diversaj landoj. Kaj tiu miraklo pravigas samtempe nian universalan aserton, ke esperanto estas facila, regula, logika, vivanta lingvo.

# ESPERANTO – KOBOLDO

F. SZILAGYI

Mi jam delonge malkovris la koboldon. Pri tio atestas mia rakonto en la "Granda Aventuro". (Pri mia knabina animo). Sed ĉifoje temas pri aliaj friponaĵoj de nia propra koboldo. Vi eraras, ne temas pri la preskoboldo, sed pri longplana maliculo, kiu tamen same, kiel ĉiuj koboldoj fine de sia malico moke eligas sian langon. Li ne toleras gravon kaj aplombon. Nur metafore kaj fantazie, ĉar kiel ĉiuj ceteraj mitologiaj estaĵoj ankaŭ la koboldo estas nevidebla. Kaj jen tri rakontoj pri la Koboldo, tri plendoj kontraŭ li.

Apenaŭ mi alvenis al Svislando el Hungarujo, jam en 1934 mi havis la okazon partopreni aktive la Universalan kongreson en Stokholmo. T.e. kun du svedaj amikoj ni havis la taskon redakti ĉiutage la Esperanto-aldonon de la litotuke ampleksa sveda taga gazeto "Dagens Nyheter" en esperanto por la kongresanoj. Dum dek tagoj ĉiutage ni devis solvi dilemon: kiel provizi la gazeton per taŭgaj novaĵoj kaj artikoloj, kaj kiel partopreni en la plezuroj de la kongreso, kies duopoj kaj triopoj elformiĝis sen nia kunago. Ni ne povis solvi niajn geometriajn problemojn: fari el la duopoj triangulon kaj el trianguloj cirklon. Ni estis iaspecaj almozuloj de granda plezurfesteno. Kun iom da sentimentaleco ni asertis, ke same kiel Zamenhof ni metis nin mem sur la altaron de la devo ordonanta. Estis troigo, sed ni estis junaj.

Unu tagon mi ricevis la taskon kapti indiĝenon, se eble el Afriko, por intervjuo. En tiu tempo Afriko estis "terra incognita". Ĉirkaŭ la 9-a de mi ĵetis min en la kongresan svarmon; estis ja dumil kongresanoj kaj relative rapide mi sukcesis solvi mian malfacilan taskon. Kun la helpa monro de bonvola samideano mi direktis mian paŝon al vera afrikano en iu angulo de la sveda parlamenta domo, pitoreske bela urboparto cetera kie la maro kaj la ondoj de la dolĉakva Melarlago renkontiĝas en amkareso. Sed jes... la afrikano. Li estis la plej afrika afrikano de la mondo. Kvazaŭ oni estus lin eltondinta el iu aventura ĉasromano. Lia aspekto konjektigis minimume dek pafitajn leonojn. Li estis alta, kreolvizaĝa, bela, juna viro kun en tiu tempo tute ne kutima barbo. Malhelokula, iom ŝejkaspekta, li estis elegantulo kaj ĉiu intervjuĉasisto devis senti kolektiĝon de la salivo en la buŝo pro la vido de tia viktimo. Proksime al li staris kelkaj sensignifaj eŭropanoj, malgrasa junulo kaj iaspeca ne juna spicvendiŝto aŭ eble bakisto el Germanujo aŭ Anglujo, malgravuloj, kiujn eĉ la svedaj geknaboj, kolektantaj aŭtografojn, indiferekte preteriris.

Mi iris rekte al la afrikano kaj afable alparolis lin: "Bonan tagon, samideano!" – "Bonan tagon, sinjoro Szilágyi". Mi surprizigis, tre agrable. Oni konas min eĉ en Afriko! Ĉu? Mi ja verkis jam pli antaŭe du librojn en Hungarlando, sed mi tute ne imagis, ke ili lumigis eĉ la plej malhelan Afrikon. Mi iĝis iom konfuza, sed entute mi sentis kontentecon.

Tuj post tiu ĉi komenco sekvis daŭrigo, kiu pruvis, ke esperantistoj ne ĉiam povas kompreni unu la alian. Li parolis bonan Esperanton kaj ankaŭ mi, sed estis ia nebulo super kaj ĉirkaŭ ni, kiu tute miskirlis, groteskigis nian parolon. Mi volis scii pri la afrika movado kaj mia afrikano parolis pri tio, kial li ne sendis monon al mi. Tiel daŭris nia freneza konversacio dum du – tri minutoj (kun la nevideble rikananta koboldo en la fono), kiam mi fine komprenis, ke ĉi tie nur rekta, akra tranĉo kaj klara demando povas helpi. "Nu, kia estas la situacio de Esperanto en Afriko?" – "Afriko? Ĉu vi freneziĝis?" – "Ĉu vi ne estas afrikano?" – "Ĉu vi ne rekonas min? Mi estas Sándor E. el Hungarlando kaj vi promesis prizorgi miajn valutaferojn en Stokholmo."

Mi furioziĝis: "Ne koleru, sed estas tre stulte de vi kaŝi viajn trajtojn sub tia aĉa ampleksa barbo. Aŭ ĉu vi faris ian krimon? Oni ne povas rekonu vin."

La sensignifa, blankhaŭta, diketa kaj neeleganta samideano apud ni enmiksiĝis en la diskuton: "Perdonon sinjoro. Vi eraris. Oni montris verŝajne min al vi, Nome mi estas afrikano. El Alĝerio..."

Ĉi tie povus fini la promesitan unuan epizodon, se la Koboldo estus kontentiginta tiom da ŝerco. Sed ne estis tiel. Dum la hungara nacia festo jam post la kongreso mi ĉeestis kunvenon en la hungara legaciejo kaj komercisto, kiu venis rekte el Budapeŝto kaj estis orientita nek lingve nek tipografie en Stokholmo, kom-

encis konversacii kun mi kaj laŭdis Esperanton, kiun li ja ne parolis, li diris, sed li havis okazon sperti eĉ en sia hotelo, kiel glate funkcias kaj kiel nature, simpatie kaj loge la internacia lingvo de Zamenhoj. Baldaŭ ni komencis paroli pri la hotelgastoj en lia hotelo, inter kiuj estis iu interesa Kristotipo, kreolvizaĝa, bela viro, nepre el iu alia kontinento. Mi eksuspektis, ke temas pri la sama pseŭdo-afrikano, kaj baldaŭ mia suspekto praviĝis. Li tre entuziasmis por tiu viro. "Ĉu vi parolis kun li?" - "Ne, sed iun matenon li venis al mi kaj demandis ion en Esperanto". - "Kaj vi?" - "Mi ne scias Esperanton, sed mi balbutis ion france. Sed li ne komprenis min". - "Kaj vi?" - "Mi provis balbuti angle". - "Kio okazis do?" - "Li respondis germane. Mi estas tre malforta en la germana lingvo, sed speciale tiam mi konfuziĝis, ke mi apenaŭ povis respondi". - "Kaj vi?" - "Kaj ni ridetante disiĝis, sciante ke nur Esperanto povus helpi nin". - "Vi eraras, sinjoro. Kial vi ne provis la hungaran lingvon? Tiun vi ambaŭ komprenas..."

La dua kaj la tria koboldaj historioj ligiĝas al vojaĝo al Vieno kaj reen per Danuba ŝipo. Mi volas ĉifoje preterlasi la turisman reklamon pri la du belaj metroloj Budapeŝto kaj Vieno kaj kvankam estus agrable priskribi la ripozigan veturadon per la ŝipo, mi nun konstata nur, ke la vojaĝo al Vieno estis iom tro ripoziga, ĉar ĉirkaŭ la vespero ni venis en nebulon (estis en julio en la mezo de tridekaj jaroj). La ŝipo senmove kuŝis sur la ondoj dum preskaŭ ses horoj. Mi ripozis en t.n. ripoz-seĝo kaj ekdormis, havis verŝajne belajn sonĝojn, ĉar kiam mi vekiĝis, ni jam estis proksime al la limo; la nebulo malaperis kaj en la plena elektra lumo de la ŝipo, tuj apud mi, staris ĉarma blondulino, ĉu germana tipo aŭ slava, mi jam ne memoras. Malferminte miajn okulojn, la unua, kion mi rimarkis en ŝiaj manoj, estis Heroldo de esperanto, kiun ŝi atente esploris. Mi kredis, ke temas pri la daŭrigo de mia sonĝo: "Bonan vesperon! Ĉu vi estas esperantistino?" - "Ne, ne, ne", sonis la germana respondo, dum kiam la fraŭlino tre bele ruĝiĝis. Ŝi klarigis iom malfacile germane, ke ŝia fianĉo estas esperantisto kaj ŝi ricevis la gazeton

por konvinkiĝi, ke ŝi povus lerni Esperanton; ŝi ja studis en la lernejo ankaŭ la francan.

Kial trolongigi tiun ĉi epizodon. Mi provadis kvar lingvojn sinsekve ĝis ni komprenis, ke denove la Koboldo petoladis kaj ŝi estis hungarino kaj ni parolis dum pli ol unu horo lingvojn, kiujn aŭ ŝi aŭ mi ne regis sufiĉe. Sed la ŝipo estis tro internacia.

La tria rakonto estas tute alispeca. Mi revenis per la sama ŝipo el Vieno, kie mi aranĝis interkonsentojn kun kortega konsilisto Steiner. (Tio signifis, ke ni batalis leonece ĉiu por sia "verda" ĉefurbo. Iam niaj landoj estis en la sama ŝtatfederacio kaj tiam oni terure opoziciis kontraŭ la alia; post la unua mondmilito, sendependaj (?), ni nur rivalis, sed kiel bonaj esperantistoj ni akiris ekstreme la diskutojn, se temis pri pacaj, turismaj problemoj, eble nur por pruvi, ke oni bone povus malspacigi per Esperanto. Sed tuj post la disiĝo ni estimis simpatie unu la alian). Al Budapeŝto tiam veturis amaso da eksterlandanoj. Mi volas konsideri la spacon de la gazeto kaj preterlasante la ravegajn vesperajn vidaĵojn sur la Danubo, (faru tiun vojaĝon se vi volas havi plezuron), mi mencias nur, ke duonhoron antaŭ la alveno, hungara konato alparolis min: "Vi estas esperantisto. Certe vi konas iun bonan, ne multekostan hotelon en Budapeŝto. Tie estas germana paro. Ili volus havi ĉambron. Ĉu ili estas esperantistoj?" - "Certe ne!" - "Domaĝe. En Hotelo Kontinental (mi devis poste iri tien, ĉar mi havis nian kunvenejon tie) esperantistoj ricevas altan rabaton". - "Se mi iras tien, ĉu estas skribite sur mia nazo, ke mi estas aŭ ne estas esperantisto?" - "Ne sed vi ne parolas Esperanton. Io alia ne estas necesa. Ankaŭ la hotelpordisto parolas ĝin. Eĉ la direktoro. Ankaŭ la gastoj kvankam inter tiuj estas kompletaj komencantoj". Mia amiko forvapiroĝis. Estis bela vespero, mi ne havis valizojn, mi do promenis al Hotelo Kontinental, al la kunveno. La hotelpordisto haltigis min: "Jus alvenis kelkaj esperantistoj. Ĉu vi volus paroli kun ili?" La lististo diris: "Ili estas en la lifto. Baldaŭ ili estos jam en la tria etaĝo." - "Revenigu ilin" diris la pordisto. Ili revenigis la lifton. En ĝi staris ĉirkaŭ 60-jara ruĝvizaĝa maljuna germano kaj tute simila edzino. "Bonan vesperon gesamideanoj; bonvenon en Budapeŝto. Kiel vi fartas?" Silento. Mi provis nur kun 15-kilometra rapideco. Silento. La paro iĝis ruĝa kiel matura tomato. "Ĉu vi ne estas esperantistoj?" - "Ne sinjoro. Sed iu sur la ŝipo diris al ni, ke oni donos al ni rabaton en tiu hotelo se ni diros ke ni estas esperantistoj". Kaj la Koboldo rikanis...

JULIO BAGHY skribis por vi:

# ZIGZAGE LAŬ FANTAZIO

(Fragmento el letero)

Vi skribis, ke du demandoj turmentas vin postulante respondon: 1) kio estas astrologio? 2) Ĉu la muziko estas parto de la kosma penso aŭ la tuto? – La demandoj ekspronis mian fantazion. Permesu, ke mi prezentu la opinion de "poeto", kies fantazio plej ofte senbride zigzagas.

1) La modernaj ĉiosciantoj asertas, ke la astrologio estas pseŭdoscienco, fakte nur superstiĉa arto por trompi siajn adeptojn kaj la kredemulojn. Jes, tia estas la aserto, sed la modernaj scienculoj ofte neas tion, kion ili ne komprenas, miskomprenas aŭ simple neglektas. Scienco estas la astronomio.

Laŭ mia imago en antikva epoko la astrologio kaj astronomio formis kunkreskintajn ĝemelojn kaj, tre verŝajne, en la antaŭhistoria tempo oni havis nur astrologion, kies pozitive sperteblaj fenomenoj fariĝis la bazo de astronomio. La pratempa primitivulo, same kiel la hodiaŭa instruisto, rigardas al la stelplena firmamento kaj tiam sugestis kredon dum nun ĝi donas jam parton de scio. Intence mi forlasis la artikolon, ĉar ĉio, kion la modernaj teleskopo-gigantoj nun igas proksima al ni, estas parta scio, sekve scioparto de la scio: la eterna kosma Penso. Ĝi riveliĝas disigite en miliardoj da formoj por complete krei unu tuton, preskaŭ nepercepteblan per la homa menso. Kial? Ĉar la limigiteco neniam povos perfekte percepti senlimecon. Do la iam kunkreskintaj ĝemeloj, kredo kaj scio, disiĝis kaj nome fariĝis astrologio kaj astronomio. Alivorte la astrologio estas scienco de sentoj kaj la astronomio estas scienco de pensoj. Nek la unua, nek la dua estas pseŭdoscienco, sed ili ambaŭ nun aparte respogas tion, kion ili kune montris en la antikva epoko; la reale nepercepteblan kaj percepteblan partojn de la kreanta vivo en senfinaj vicoj kaj nombroj de universoj.

2) Kio estas muziko? Rifma sonaro, unu-aŭ diverstona vibrado de tiuj miliardoj da formoj, kies kuna tuto konsistigas la vivon. Sekve de tio la muziko estas la ritma, ĉie ĉeestanta, unu-aŭ diverstone vibranta sonaro de la kreanta vivo, la melodio de la universo, la parolo de la

kosmo. Ni ne tre bone scias, ke ekzistas vibroj percepteblaj kaj nepercepteblaj per la homa aŭdorgano; ankaŭ tion ni scias, ke centmiloj da melodioj estis jam aŭdataj, pli ĝuste perceptataj ne per la oreloj. Oni pensu momenton pri la komponaĵoj de la surdiĝinta Beethoven, kiu certe aŭdis ĉiun sonon de siaj simfonioj dum la komponado aŭ poste rigardante la muziknotojn, kvankam li estis absolute surda. Jes, li aŭdis, sed ne per la oreloj.

Estas supozeble, se la homo kapablus fiksi sian aŭdorganon al certaj ondolongoj, ke li povus kapti laŭplaĉe la melodiojn krozantajn per diversaj ondolongoj kaj oni ne bezonus radioaparaton; sufiĉa estus sonfortiga megafono ĉe la oreloj. Eble eĉ ne tio! Nu jes, sed la homo ankoraŭ ne kapablas fiksi sian aŭdorganon por certa ondolongo, kvankam la homa organismo estas la plej perfekta aparato elektra, la plej mirinda radio-stacio por akcepto kaj disradiado de pensoj, sugestoj, simpatio kaj antipatio. Tiu ĉi homa radioaparato per ĉiuj siaj nervoantenoj perceptas la muzikon kaj parolon de la vivo kaj agas, evoluas plu laŭ la sugesta pensoforto de la kreanta vivo.

La homa fantazio ja povas image skizi tiagradan progreson, kiam post jarmiloj la homo havos novan senson, nome organan elektilon por ondolongoj de sonoj kaj pensoj. Tiu ĉi nova organo eĉ la homan lingvon farus superflua. Oni ne devus lerni sonan lingvon; estus sufiĉe per la selektosenso kapti la pensoondojn, por ke la asociado de ideoj estu daŭraj kaj reciprokaj eĉ se oni pensadus en du diversaj lingvoj. Kial? La ideoj ja havas samajn bildojn en ĉiu cerbo, sole la songrupoj elvokantaj la saman bildon estas diversaj. Fakte do ne la bildoj diferencas, nur la songrupoj riĉe varias. Multlingveco ne signifas ideoriĉon, nur abundon da songrupoj por samaj ideoj.

Kaj nun ree staras antaŭ mi via demando "Ĉu la muziko estas parto de la kosma penso, aŭ la tuto?" Konkludante el la supre diritaj mi riskas aserti, ĉar ĉiu vibro havas sonon, ĉiu sono estas muzika, egale ĉu ĝi estas unu- aŭ diverstone ritma, ĉu ĝi estas perceptebla aŭ neperceptebla; do mem la kosma penso estante vibrado prezentas kosman muzikon, en kies efiko estas la kreoforto kaj kreopovo de la

## LOGADO (*Hébergement*)

En la kastelo mem (se eble)      *Dans le château même (si possible)*  
Hoteloj (diversaj kategorioj)      *Hôtels (diverses catégories)*  
Ferio-ĉambroj en privataj domoj      *Gîtes chez l'habitant ou chambres d'hôte*  
Kampadejoj (ĉe la kastelo aŭ publika)  
                                         *en camping derrière le château ou camping public (tentes, bungalows)*

Informoj haveblaj ĉe:

**Faites connaître vos souhaits à:**

**Paulette Naulet**

**telefono kaj fakso: 02.41.82.55 22**

---

**ALIĜILO** (bonvolu aliĝi kiel eble plej frue – dankon!)

**BULLETIN D'INSCRIPTION** (*veuillez vous inscrire dès que possible, merci!*)

Nomo:

Adreso:

Telefono:

Aĝo(j)

Datoj de la staĝo (*Dates du stage*):

Mi interesigas pri la kurso de:

(*Je suis intéressé[e] par le cours de*):

Kiom da Personoj (*combien de personnes*):

Mi pagas la aliĝkostojn per ĉi-kuna ĉeko en la sumo de:-

*Je joins un chèque postal/bancaire au nom de la Maison Culturelle Espérantiste*  
**CCP NANTES 1485 39 P pour:-**

Oni sendu aliĝojn kaj ĉekojn al:- (*Veillez envoyer vos inscriptions et chèques à*):

**Paulette Naulet, Au Bourg, FR-49490 BREIL**

Eksterlandanoj povas pagi al UEA-konto *gres-y* kun indiko "aliĝo Grezijono",  
informante P. Naulet, ke vi tien pagis.

Bonvolu sendi internacian respondkuponon se vi bezonas konfirmon pri via aliĝo;  
dankon.


*N'oubliez pas de joindre un timbre si vous désirez recevoir la confirmation d'inscription;*  
*merci.*

Dato:

(*Date*)

Subskribo:

(*Signature*)



### KULTURA ESPERANTO-DOMO

*"Vera oazo en la dezerto de la lingva konfuzo"*

Kastelo Grésillon F-49150 BAUGE

Tel. 02.41.89.10.34 CCP. Nantes 1485 39 P

La senprofitcela asocio "Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj" fondita en 1951, posedas kastelon Grésillon kun 18-hektara parko. Ĝi organizas aŭ gastigas:

- kursojn diversgradajn
- prelegojn diverstemajn
- distraĵojn diversspecajn
- ekskursojn en belega regiono

Ĝi disponigas al la staĝanoj

- kurso-ĉambrojn
- riĉan bibliotekon
- riĉan libroservon
- salonojn
- butikon

*(L'association à caractère coopératif "Maison Culturelle des Espérantistes Français", fondée en 1951, est propriétaire du château Grésillon et de son parc de 18 hectares. Chaque année elle propose:*

*des cours de langue internationale de divers degrés*

*des conférences*

*des distractions variées et des excursions dans une très belle région*

*Elle met à la disposition des stagiaires:*

*des salles des cours*

*une bibliothèque importante, un riche service de librairie  
ses salons, sa "boutique"*

**SOMERAJ STAĜOJ 2000**  
**STAGES ESTIVAUX 2000**  
Provizora Programo (kompletigota)

15-a ĝis 21-a de julio

- \*Esperanto-Kursoj: 1-a-grada: Juanita Turbillon  
2-a-grada: Christian Rivière  
3-a-grada: Paul Signoret (leksikologio,  
gramatiko, preparo al "Kapableco")
- \*Kantado en Esperanto kun Monique Kimmel
- \*Piedmigrado kun Ginette Signoret

24-a ĝis 29-a de julio

- \*Esperanto-Kursoj: 1-a-grada: Przemek Grzybowski  
2-a-grada (paroliga, konversacia): Ferdi Vince
- \*Anne-Sophie Markov prezentos sian magistrigan tezon pri "La internacia movado de la esperantistaj laboristoj, 1918-1939".
- \*Teatro — praktikado kun Sylvie Bonnet
- \*Piedmigrado kun Thérèse Pinet

31-a de julio ĝis 5-a de aŭgusto

- \*Esperanto-Kursoj: 1-a-grada: Przemek Grzybowski  
2-a-grada: Odile Masseron
- \*Prelegoj i.a. du de Georges Lagrange: temoj anoncotaj.

7-a ĝis 12-a de aŭgusto

- \*Esperanto-Kursoj: 1-a-grada: Przemek Grzybowski  
2-a-grada: Marie Malézieux
- \*Pec-kudrado kun Marie Malézieux

14-a ĝis 19-a de aŭgusto

- \*Esperanto-Kursoj: 1-a-grada: Juanita Turbillon  
2-a-grada: (paroliga, konversacia): Helga Rapley
- \*Jogo kun Rose-Marie Laveau  
Antaŭvidataj ankaŭ:
- \*Aranĝoj pri Esperanto kaj Amnesty International
- \*Renkonto kun lokaj ekologiaj (rencontres avec écologistes de la région)

**KOSTO DE ĈIU STAĜO**

**180 FF**

**Aliĝo al la Asocio**

**50 FF**

**Infanoj sub 16 jaroj — entute**

**50 FF**

**Manĝoj kaj Loĝado estas aldonaj, laŭ aranĝo**



### Per trajno

Inter Le Mans kaj Saumur la buso de la Nacia Fervojo haltas en Baugé. Petu la horaron. Anoncu la horon de via alveno: iu atendos vin ĉe la bushaltejo. Dimanĉe **ne** veturas aŭtobuso al Baugé!

### Par le train

*Entre Le Mans et Saumur circule un autobus de la SNCF qui s'arrête à Baugé. Demandez les horaires de ce bus. Annoncez-nous l'heure de votre arrivée: quelqu'un vous attendra. Attention: pas de bus le dimanche pour Baugé!*

### Per aŭtomobilo

Baugé situas ĉe la vojkruĉiĝo de du grandaj vojoj: Angers-Tours (N23 - D766) kaj Le Mans - Saumur (N23 - D135). De Baugé al la kastelo, sek... la vojon D187 al Le Lude. Grésillon situas je 2 km de Baugé (dekstre).

### Par la route:

*Baugé se situe à l'embranchement de deux grandes routes: Angers - Blois [N23, D766] et Le Mans - Saumur [N23, D135]. De Baugé au château (2km) prendre la route D817 vers Le Lude. Grésillon se situe à 2 km.*

### Niaj konsiloj: (nos conseils):

**Alveno:** antaŭan tagon; **Foriro:** lastan aŭ postan tagon.

**Arrivée:** le jour avant; **Départ:** le dernier jour ou le jour suivant.

## LA VIVO EN LA ESPERANTO-DOMO

### La Vie à la Maison Culturelle

Kursoj kaj prelegoj (*cours et conférences*)

Artlaborado aŭ ripozo (*travaux manuels ou repos*)

Vizitado de la regiono (*visites de la région*)

Distraj vesperoj – staĝanoj aktive partoprenu

(*Soirées récréatives – les stagiaires sont invités à participer activement*)

Ekskursoj povas oaki laŭ aranĝo de la staĝanoj

(*Des excursions pourront avoir lieu selon le choix des stagiaires*). La

"butiko" estas agrabla kunvenejo kie oni povas trinki kaj aĉeti memoraĵojn

(*La "boutique" est un lieu de rencontre pour bavarder, où l'on peut acheter diverses boissons et souvenirs*).

**kreanta vivo** en mil miliardoj da formoj tra la universo.

Jen vi skribas: " Por krei muzikon oni bezonas ne nur ritmon, melodion, harmonion, sed ankaŭ formon. Kiu komprenis formon? Ĉu la antikvaj grekoj? Ili kapablis skulpti sen modeloj (kaj kiel?)" Vi plene pravas, kiam vi pensas pri la skulptado de la formo ekstera, kiu perfekte reflektas harmonion de proporcioj en la greka skulptarto antikva. Sed kio estas formo ekstera? Pulpo ĉirkaŭ kerno. En kerno kaŝiĝas ĉiam la speco kaj vivoĝermo. La kernon, la formon internan la grekoj malpli konis, sekve ili malpli kultivis ol la antikvaj egiptoj, hindoj, ĉinoj kaj kun bedaŭro mi asertas, ke ju pli teknikigis la civilizacio (ekstera formo), des pli vualiĝos la kulturo (interna formo).

La interna formo esprimiĝas unue en simboloj kaj en artoj spontanaj ( danco, fajfo, kanto); due en prezentaj artoj (deklamado, aktorado, interpreto de muzikaĵoj); trie en senpere kreaj artoj (verkado, komponado). La ekstera formo revelacias sin ĉefe en la kvara grupo, en instrumentaj artoj (skulptado, pentrado). Tiuj kvar grupoj de artoj kune, kaj laŭ kultivateco, donas fidelan spegulbildon pri la formoj interna kaj ekstera de iu popolo aŭ epoko. La proporcia dividiĝo de tiuj ĉi artogrupoj ebligas konstati laŭ la kultivateco la gradon, kvaliton, rilatojn al la formoj ekstera kaj interna.

La unuaj tri grupoj (simboloj, spontanaj, prezentaj kaj senpere kreaj artoj) preskaŭ ĉiam klopodas evidentigi, videbligi, sentebligi la formon internan. La kvara grupo ( instrumentaj artoj) preskaŭ ĉiam prezentas la formon eksteran. La fonto de la inspiro por la unuaj tri grupoj plej ofte estas:emo, penso, sentimento daŭra, sugesto de travivaĵoj, impresoj, imagoj. Ili estas la artoj de la sentoj. La kvara grupo estas inspirata plej ofte de la videbla realaĵo, naturo, sugestoj de konkretaĵoj. Ili estas la artoj de la sensoj.

Sendube, ke ĉe la antikvaj grekoj proporcie, la kultivado de la kvara grupo superis la kultivadon de tiuj artoj, kiuj troviĝas en la unuaj tri grupoj kaj tial mi diris, ke la grekoj estis majstroj de la formo ekstera en tiu epoko, kiam la egiptoj, hindoj, ĉinoj superis ilin en la artoj de la formo interna. Tamen ne estu miskompreno! Neniel mi deziras aserti per tio, ke la greka antikva kulturo estis malpli valora kaj malpli epokfara por Eŭropo kaj ke ĝi ne havis majstro-verkojn ankaŭ en la arto de la formo interna. Objektive: Oriento prefere kultivadis tiujn artojn, kies bildoj formiĝis interne sub influo de la senbrida fantazio; Okcidenton influis pli la realaĵoj. El la reciprokaj efikoj dum longdaŭra paco povos formiĝi nova, internacia kulturo, en kiu ekvilibras proporciojn havos ĉiu grupo de la artoj.

Amiko, via demandema meditado, viaj preferataj studobjektoj kaj la artista memo de ni ambaŭ igas konjekti, ke nin ambaŭ interesas pli la formo interna ol la ekstera... almenaŭ min plej ofte inspiris tiu interna melodio, neperceptebla per oreloj, kiu serĉis vortojn por iome interpreti tion kion nur mi aŭdis kaj plej ofte impresis min tiuj nevideblaj sed diveneblaj internaj, psiĥaj fenomenoj, per kiuj mi povis krei miajn romanfigurojn... kaj fine ni ambaŭ, amiko, partoprenas en kolektiva kreado de artaĵoj, kies ĉiu elemento estas interna kreaĵo: literaturo de internacia lingvo. Iam ĝi, mi esperas, respegulos la internan memon de tiu nova homotipo, kiun la kreanta vivo produktos sur nia komuna patrujo, sur la tero.



# PLI BONE PER OL PRI

Dum mi verkas tiun artikolon, en la kastelo Grésillon bruadas ĉirkaŭ mi voĉoj; jam konataj voĉoj de amikoj delonge regulaj vizitantoj de la Kulturdomo, kaj voĉoj nekonataj, tute freŝaj, de multaj gejunuloj, novbakitaj esperantistoj. Ili estas 60, kiuj ricevis oficialan monhelpon de la franca ŝtato por partopreni en la Kultura Semajno organizita tie. Per grupetoj ili venis el ĉiuj "anguloj de Francujo. Ili ne konis sin reciproke ĝis la nuna momento, kiam sama deziro al plia kono de Esperanto kunvenigis ilin en Grésillon. Ili lernis la elementojn de la lingvo en diversaj lokoj, laŭ diversaj metodoj, sed ĉiuj nun havas la eblon kontroli la valoron de siaj akiraĵoj kaj de Esperanto mem. Ĉar la celo, almenaŭ la rezulto de tia kunveno estas triobla: intermikiĝo de gejunuloj diversregionaj (preludo de internaciaj renkontiĝoj), ĝusta taksado de siaj konoj, tuja kontakto kun eble la plej alloga aspekto de Esperanto: la kulturo. La gejunuloj trovas tiamaniere la okazon ne fariĝi eks-esperantistoj aŭ eternaj komencantoj.

La eternaj komencantoj ne ĉiam kulpas. Oni lernas esperanton aŭ por egoista celo, aŭ por idealista celo: disponiĝo al la homoj de ilo kapabla frakasi por ili lingvajn barilojn. La unua kategorio sufiĉe facile kontentiĝas, kiam la lingvo-nivelo eĉ malalta sufiĉas por permesi al ili plenan ĝuon de siaj plezuroj. (Ne kredu, ke mi malestimas la gesamideanojn apartenantajn al tiu kategorio. Multaj el ili estas tre lertaj esperanto-lingvanoj. Sed al tiu kategorio apartenas ankaŭ la eternaj komencantoj.) Al la dua kategorio apartenas la plej aktivaj esperantistoj. Sed kiom el la gejunuloj idealistaj forlasis nian aferon post nur kelkaj paŝoj? Kion ili serĉis lernante esperanton? La plenumo de malegoistaj deziroj aŭ simpla eblo de interkomunikado kun alilandaj gejunuloj. Post kelksemajna lernado ili plej ofte deziras jam pesi siajn konojn kaj ĉefe utiligi ilin. (Ni neniam forgesu, ke la pli multe el la personoj al kiuj ni parolas pri esperanto demandas: "Por kio ĝi utilas?") tre frue ili povas jam uzi siajn akiraĵojn per simpla korespondado aŭ interŝanĝo de aĵoj aŭ de dokumentoj. Sed tre rapide tio ne sufiĉas kaj tie situas la

decidiga punkto: se ni ne respondas la dezirojn de la nova esperantisto, li aŭ ŝi baldaŭ forlasos nin kaj fariĝos, eble ne malamiko, sed almenaŭ elrevigita eks-samideano. Oni ne lernas pro la nura plezuro lerni; pro tio en la lernejoj tiom da studobjektoj estas malatentitaj ĉar la lernantoj ne "vidas" ilian tujan utilon. Tiu utilo de esperanto varias laŭ ĉiu aparta karaktero sed la plej bona rimedo por tute interesigi la gejunulojn pri esperanto estas doni al ili la okazon uzi ĝin ek de la komenco se eble kun eksterlandanoj. Oni ne tro parolu al ili pri esperanto; oni interusu ilin per esperanto. La nura scio, eĉ bonega, de la lingvo ne estu fonto de fiero. Esperanto ne estas dio kiun oni adoras kaj servas ĉerpanta plezuron el tiuj adoro kaj servo; Esperanto estas preciza ilo, kies uzadon oni devas zorgeme lerni. Oni ne konservas preciozan ilon en tirkesto aŭ sub vitra globo por ĝin admiri. Oni uzas ĝin kaj ĝuas la uzadon. Tion oni faras per legado kaj aŭskultado de prelegoj.

Forirante, ĉe la fino de la periodo la 60 gejunuloj, kiuj partoprenas la Kultur-Semajnon povos diri: "Per esperanto mi lernis ion pri la fundamentoj de la publika parolarto, pri Gottingen kaj la matematikisto Gausse, pri okulumalsanoj, pri Provenco, pri Rabelais, pri la Ciganoj, pri la Eŭratoma organizo, pri multaj diversaj aferoj. Esperanto estos alportinta al ili ion. Kaj tio gravas.

P. BABIN (1963)

## MEMORU

La Fonduso Sekureco daŭre bezonas vian monhelpon. Sendu vian ĉekon al  
-Esperanto-Domo 49150 - BAUGE  
-poŝtkonto 1485-39 P. Nantes  
-nia konto ĉe UEA: gres-y.

## KOMITATKUNVENO-GRESILLON 1a/11/1999

Prezidas: Ch. Rivière. Partoprenas: D. Babin (dB), R. Bouchet rB, D. Gourdon (dG), C. Bureau (cB), Y. Corvaisier (yC), P. Freslon (pF), M.T. Lloancy (mL), A. Legros (aL), J. Marolleau (jM), P. Naulet (pN), Maryse Martineau (mM), J. Vincent (jV). Senkulpigita: H. Boyet (hB), Guy Dairon (gD), G. Lagrange (gL).

Aprobo de la protokolo de la 1999-07-03 kunveno de la komitato.

Propono de la prezidanteco: neniu konsentas, do necesas daŭrigi la kolektivan sistemon por administri pere de komisionoj.

Disdono de la taskoj: konstruaĵoj: rB, cB, yC, yM, pN. – staĝoj: mL, gL. – preparado de la kunvenoj: dB, cR (helpos mM). – financoj: jV, gD kun teknikaj konsilantoj dG kaj John Rapley

Kontoj: (rap. dG) je la 30a de septembro 1999. CN Epargne: 236046 f. – Crédit Agricole: 26713 f. – Banque Pop. 103456 f. – CCP 98939 f. – kaso 1104 f. alia 283f. – En la kaso 466542 f. necesas aldoni 24000 f. ĉe UEA. – Donacoj ricevitaj: 432319 f.

La listo de la donacintoj (kun la sumoj) estos sendita kun dankvortoj sur Internet pere de J. Rapley. pF surpaperigos tiun liston kaj transdonos ĝin al cR antaŭ tri semajnoj.

Staĝoj 1999: profito de 35000f; proksimume malgraŭ ke ni ne loĝigis la partoprenantojn ĉar la respondeculoj laboregis; ili tute ne dungis helpantojn por mastrumi.

Elspezoj: dG kontrolas ĉu la impostoj estas taŭgaj. – Je kelkaj postenoj eblis malaltigi la elspezojn: anstataŭ doni pli ol 10 000 f. ĉe CAT, ni trovis agrikulturiston, kiu falĉis por havi la fojnon. Bonvolemluloj tondis kaj faris parton de la laboro de la ĝardenisto por malaltigi lian salajron; aliaj faros la kutiman laboron de la tubistoj aŭtune kaj printempe.

Subvencioj: pM mendas ĉe St Martin, Pontigné, Baugé kaj ĉe regiono pere de Roselyne Bachelot. mL jam kontaktis G. Pirlot por mendi helpon ĉe Eŭropo.

Tranformoj en la kastelo: Je la 2a venis la arkitekto por klarigi la planitajn laborojn. Pluraj ŝanĝoj estis menditaj post studo de la preparitaj planoj. La komitato decidis elspezi 300 000 f. por krei ekstereliron de la jam ekzistanta ŝtuparo inter la 1a etaĝo kaj la teretaĝo kaj por translokigi la varmigilon. Ĉiuj komitatanoj donis povon al R. Bouchet por subskribi la antaŭfakturojn. La 2a parto de la laboroj, por normigi la 2an etaĝon kostus 40 000 f. Jam preparita estas la plano. Eblus realigi ĝin pere de subvencioj kaj pliaj donacoj.

Staĝoj: (detala raporto havebla ĉe mL) 45 partoprenantoj, tre agrabla etoso; grava sukceso kiam venis la lingvistino H. Walter. Por somero 2000, 5 semajnoj estos planitaj. La datoj dependos de la intervenantoj.

Manlaboroj: La 2an kaj la 3an de oktobro R. Bouchet, A. kaj B. Bourdet, D. kaj C. Bureau, G. Dairon, P. kaj R. Naulet, M. Noulain ŝanĝis la 30 lampetojn sur la unua etaĝo, tranĉis ie kaj tie heĝojn, hederon, arbojn, farbis per Xylophène meblojn parte atakitajn de vermoj, regluis paperojn, metis mastikon ĉe fenestroj. Aliaj samaj semajnfinoj estas necesaj kaj planotaj La sekvanta okazos la 20-an de novembro. Printempe la kastelo devos esti purigata post la laboroj;

Diversaĵoj: jM vizitis MAIF-oficejon por kontroli ĉu taŭgas la nuna kontrakto kiu datumas de 1993. – La komitato konsentas pri venigo de lignoaĉetantoj por vendado, dum la vintro, de maturaj arboj (zorgos la edzoj de cB kaj pN. – Ĉar venas ofte ĉasistoj en la parkon, S-ro Desbois, la ĝardenisto, petis sian elekton, kiel ĵurligitan gardiston. – Nepre necesas, ke ĉiuj aĉetantoj de kapitalpartoj ricevu pagateston. J. Vincent zorgos pri tio. – Por raporti pri 1999 ni kunvenos la 15-an de aprilo 2000. Necesos alvoki 5 kandidatojn ĉar mankas tri personoj por kompletigi la novan 15-membran komitaton, plus 2 renovigotaj komitatanoj.

Informi pri Grésillon: Jena mesaĝo estis kune redaktita: "Dank'al viaj donacoj ni faros en Grésillon, antaŭ la fino de 1999, truditajn transformojn por proksimume 300 000 f. Tio devus permesi la uzadon de la dormoĉambroj sur la unua etaĝo ekde somero 2000. Ni estas preparantaj la programon. Por ke ni daŭrigu sur la dua etaĝo ni daŭre bezonas viajn donacojn. Antaŭdankojn de la komitato" – pN sendos al mN por "Ret-info" kaj resumos la decidojn de la GK kaj de la Komitato por la revuoj de UEA kaj SAT-Amikaro.

raportis: Claudie BUREAU

# Nia Postularo

Post momento ni staris vizaĝon kontraŭ vizaĝo, mi kaj tiu ĉi malforta estaĵo el la estonto. Li venis rekte al mi kaj ridis en miajn okulojn. La manko de ia timo en lia mieno trafis min tuj. Tiam li turnis sin al la du aliaj, kiuj sekvis lin kaj parolis al ili per stranga kaj tre dolĉa, flua lingvo.

Aliaj venis kaj baldaŭ ĉirkaŭis min, malgranda grupo de eble ok aŭ dek el tiuj ĉi elegantaj hometoj. Unu el ili alparolis min. Estas strange, ke venis al mia penso, ke mia voĉo estas tro raŭka kaj basa por ili. Mi tial skuis la kapon, kaj, indikante miajn orelojn, reskuis ĝin. Li antaŭenpaŝis, hezitis, kaj tiam palpis mian manon. Tiam mi sentis aliajn molajn fingretojn sur miaj dorso kaj ŝultroj. Ili volis certigi, ke mi estas reala. En tio estis nenio timiga. Efektive estis io pri tiuj ĉi belaj hometoj, kio inspiris konfidon, ia gracia ĝentileco, ia infana naiveco. Plue, ili aspektis tiel malfortikaj, ke supozeble mi povus disĵeti la tutan dekduon, kiel keglojn. Sed mi faris subitan movon por averti ilin, kiam mi vidis iliajn rozkolorajn manetojn palpi la Tempo-maŝinon. Feliĉe, tiam, kiam ne estis tro malfrue, mi pensis pri danĝero, kiun mi antaŭe forgesis, kaj klinante min super la orelojn de la maŝino, mi malŝraŭbis la ilojn, kiuj funkciligas ĝin, kaj metis ilin en mian poŝon. Tiam mi turniĝis ree por eltrovi kio estas farebla rilate komunikadon.

Kaj tiam, rigardante pli zorge iliajn trajtojn, mi vidis pliajn strangaĵojn en ilia Dresden-porcelana beleco. Ilia hararo, kiu estis regule bukla, subite finiĝis ĉe la kolo kaj la vango; estis nenias signo de ĝi sur la vizaĝo, kaj la oreloj estis neordinare etaj. La buŝo estis malgranda, kun helruĝaj, iom maldikaj lipoj kaj la mentoneto finiĝis en pinto. La okuloj estis grandaj kaj mildaj; kaj (eble ŝajnas egoisme) mi imagis eĉ tiam, ke estas ia manko de la intereso, kiun mi atendis trovi ĉe ili.

Ĉar ili ne klopodis interkomuniki kun mi, sed nur staris ĉirkaŭ mi ridetante kaj parolante inter si per mallaŭtaj, dolĉaj sonoj, mi komencis la konversacion. Mi fingre montris la Tempo-maŝinon kaj poste min. Tiam, pripensante momenton, kiel esprimi la tempon, mi indikis la sunon. Tuj beleta malgrandulo purpure kaj blanke

vestita sekvis mian geston kaj tiam mirigis min imitante la bruon de tondro.

Dum momento trafis min surprizigo, kvankam la signifo de lia gesto estis sufiĉe klara. La demando abrupte venis en mian menson: ĉu tiuj ĉi homoj estas stultuloj? Vi povas apenaŭ kompreni, kiel tio impresis min. Mi ja ĉiam supozis, ke la homoj de la jaro okcent dumil estos nekredeble pli lertaj ol ni rilate al scio, arto, ĉio. Tiam unu el ili subite faris al mi demandon, kiu montris, ke li estas sur la intelekta nivelo de unu el niaj kvinjaraj infanoj: li demandis al mi fakte ĉu mi venis de la suno dum fulmotendro! Ĝi liberigis la juĝon, kiun mi estis prokrastinta, pri iliaj vestaĵoj, iliaj malfortaj nepezaj membroj kaj kadukaj trajtoj. Ekfluo de seniluziigo trarapidis mian menson. Dum momento mi opiniis, ke vane mi konstruis la Tempo-maŝinon.

Mi kapjesis, indikis la sunon, kaj donis al ili tiom realan imiton de la tondro, ke ili ektimis. Ili ĉiuj faris paŝon malantaŭen kaj riverencis. Tiam unu venis ridetante al mi, portante ĉenon el belaj floroj tute novaj al mi, kaj metis ĝin ĉirkaŭ mian kolon. Ili akceptis la geston kun melodia aplaŭdo; kaj baldaŭ ili ĉiuj kuradis tien kaj reen por kolekti florojn, kiujn ili ridetante ĵetis sur min ĝis mi estis preskaŭ florkovrita. Vi, kiuj neniam vidis similajn, apenaŭ povas kompreni, kiajn delikatajn kaj mirigajn florojn jarmiloj da kulturo estis kreintaj. Tiam iu sugestis, ke ilia ludilo estu elmontrata en la plej proksima konstruaĵo, kaj sekve oni kondukis min preter la sfinkso el blanka marmoro, kiu ŝajne rigardis min la tutan tempon kun rideto pri mia miro, al vasta griza konstruaĵo el ĉizita ŝtono. Irante kun ili, mi kun nerezistebla amuzo memoris miajn memfidajn esperojn pri profunde serioza kaj intelekta posteularo.

(El "La Tempo-maŝino" de H.G. Wells)

tradukita de E.W. Amos

# POR VIA DISTRO

VORTOJ: 1- Kopio

2- Nilo

3- Morto

4- Perdo

5- Ne

6- Latva

7- Eta

8- Sen

9- Dece

10- Rido

TITOLO: Enciklopedio de Esperanto.

ELDONEJO: Literatura Mondo.

## BONAN VOJAĜON

Martha verŝajne trovos komplezeman ŝoforon. Sed ĉu ankaŭ la faŭmilianoj ? Ili devos esti paciencaj. Ankaŭ vi estu pacientaj por trovi la ok diferencojn inter la du desegnoj.



## Sekvo de paĝo 1-

ĜENERALA KUNVENO je 31a de OKTOBRO 1999

- **Ŝanĝo de statuta strukturo** ( ne plu kooperativo) leĝe egalas transdono de kapitalo de unu societo al alia kaj kostas 35% de la kapitalo! En okazo de tuj alprenota decido, kio okazu sen prezidanto ?

-**Voĉdono:** Kiel kunmiksi la voĉojn de la nun ĉeestantoj, kiuj pridiskutis la problemojn kaj kiuj krome posedas rajtigojn, kun la voĉoj de tiuj perkoresponde voĉdonintaj, kiuj jam sin esprimis ne partopreninte la diskutojn ? Fine oni prokrastas la voĉdonon al la posttagmezo.

II- b) - Modifo de la artikolo 10a de la statuto. (En okazo se la Komitato funkcias kun kolektiva direktado, post modifo de la Art. 11a, la komitato iĝus 15-membra por havi pli da helpantoj kaj plie malparan nombron). Prezentas P. Naullet, kiu insistas pri la pliaj helpantoj. J. Rapley: "jes, konsentite, sed ju pli ampleksa estas la komitato, des pli malbone ĝi funkcias." - Cetere povus esti kandidato al prezidanteco inter la elektotoj. Tiukaze, la morgaŭa Komitat-kunveno eble povos solvi la problemojn.

Voĉdono: dependas de la antaŭa rezulto (art. 11a). Estos kontrolita posttagmeze.

III- Financa raporto de la jaro 1998: Tiu raporto estas prezentita kun malfruo. Oni rimarkas, ke en "Komentario" sur la 4a paĝo kuŝas kopi-eraro: la porlaboraj donacoj sumiĝas je 374 651 fr. ne 974 651 fr.. Krome neniu grava rimarko. La ĉeestantaro ŝajne fidus la profesion kontistojn. La posttagmeza analizo de la perkoresponda voĉdono donos la aprobon aŭ malaprobon al la financa raporto.

**Tre grava informo:** Ĝus alvenis letero de J.M. Cash akompanata de ĉeko je 20 000 fr. kiuj iĝu "Sociaj Partoj" por la Kooperativo. Jen resume la enhavo de tiu letero:

aprobos la ĝisnunajn klopodojn por pludaŭrigi Greziljonon - sugestas amas-alvokon al aĉeto de pliaj "partoj" por kreskigi la kooperativan kapitalon, kio donus garantian por tuta aŭ parta repago en kazo de forvendo kaj por ebleco esti konsultota antaŭ ĉia ajn perdo de sendependeco - deziras, ke oni aranĝu kampanjon tiucelan - opinias nepre necesa pli longdaŭran malfermon de la kastelo, eventuale laŭ kontraktoj kun aliaj asocioj.

IV- Bilanco: Neniu komento. Neniu petas precizigon. Ĉiu fidus la raportiston. Pri aprobo aŭ malaprobo decidus la kontrolado de la perleteraj voĉdonoj.

V- Laboroj kaj transformoj: por 1998: (oni jam raportis pri tio dum komitat-kunveno). Ĉi tiam raportas D. Babin. Ĉefa laboro estis normiga restrukturado de la elektra instalaĵo kaj la almeto de laŭnormaj alarmiloj. Kosto: 440 000 fr. Dank'al tiuj transformadoj kaj pro la kontrolo de nova, plia kontrol-komisiono, ni ricevis en decembro '98 la permeson uzi la teretaĝon de la kastelo kaj la dependaĵojn. Kromaj kondiĉoj estis: adapti la kuirejon al la normoj (por nur minimuma uzo!) kaj nulige fermi la kamenojn. La aranĝojn en la kuirejo faris profesia tubisto, la ceteron volontuloj.

por 1999: raportas P. Naullet. Ĉar la sekurkomisiono postulis ankaŭ la anstataŭigon de la murlampoj en la ĉambroj kaj koridoroj, tion faris volontuloj, tiel ke tio kostis nur la aĉeton de la laŭnormaj lampoj (1300 F.) dum la metiisto proponis la laboron por 11 000 fr. - La ĉefaj kaj daŭre nesolvitaj problemoj koncernas: la sav-ŝtuparon el la unua etaĝo (por la dua etaĝo la demando estas tute alia) kaj la translokado de la hejtaparato. - Problemoj interalie ĉar la arkitektoj, la metiistoj kaj la sekur-kontrol-istoj (antaŭnecesaj por havi postan garantion) ne ĉiuj kantas la saman kanzonon.

**SAVŜTUPARO:** Ekstera savŝtuparo el la unua kaj el la dua etaĝoj nepre necesa. Kosto: 300 000 fr., 150 000 fr., 80 000 fr. plus masonaĵoj (?!?) - Tia ŝtuparo ne necesas. Sufiĉas adapti la internan ŝtuparon (al la tolaĵejo) ke ĝi eliru rekte eksteren kaj fermi la nunan ŝtuparon al la dua etaĝo.

**HEJTEJO:** Ĝi estu translokita al la malnova tolaĵlavejo (buanderie) - Tio tamen funkcios por hejti la tutan kastelon (laŭ "a") - Per tio oni povos hejti nur la teretaĝon (pro la vapor-sistemo) (laŭ "b") ??? La arkitektoj Chataignier (kun SOCOTEC) kaj Marteau ne sam-opinias. Tubisto Richard ankaŭ alie opinias. - Devigo pasi tra SOCOTEC por esti certa pri akcepto far la sekurkomisionoj. - Rajto entrepreni la (laŭnormajn) transformadojn: 7000f.

- Por ricevi "konform-atestilon de la elektristo, kiu jam faris mem la transformojn (tra SOCOTEC) 11000 fr.

KUIREJO: Por la normigo oni devus instali plafonon "fajrohaltigan" - aranĝi la cirkuladon de la pladoj tiel ke puraj kaj malpuraj neniam renkontkruciĝu.

VI- Raporto pri la staĝoj 1999: Raportas M. Th. Lloancy - Oni notu ĉefe: Granda sukceso de la prelego de Henriette Walter: 70 partoprenantoj el la tuta regiono, ne nur esperantistoj. - La somerajn staĝojn partoprenis entute 46 personoj malgraŭ aĉaj loĝkondiĉoj - estis 30 novuloj (vigle helpemaj) - estis 20 komencantoj - la neta profito estis 35 000 fr.

D.Babin: "Perspektivoj por la venonta jaro ?" - se la normigoj estos plenumitaj ( unua etaĝo kaj hejtaparato) normala funkciado, kun kompleta programo.

Ankaŭ pri somero '99: reklamo en Berlino dum la UK alportis 4 000 fr. - en la UEA-banko estas 7000 Eu., ĉirk. 24 500 fr.

POSTAGMEZA KUNVENO Kontrolo, nombrado de la perpoŝtaj voĉoj:

|           |          |        |                |              |
|-----------|----------|--------|----------------|--------------|
| Kontoj:   | jes 190; | ne 5;  | sindetenoj 16; | : akceptita  |
| Bilanco:  | jes 155; | ne 1;  | sindetenoj 26; | : akceptita  |
| Art. 10a  | jes 143; | ne 46; |                | : akceptita  |
| Art. 11a: | jes 126; | ne 53; |                | : akceptita. |

Praktike nur la perpoŝtaj voĉoj decidis pri la rezultoj.

VII- Elektro de novaj komitatanoj: Ricevis voĉojn:

Rémy BOUCHET: 153, Yvette CORVAISIER: 140, Philippe FRESSON 57, André LEGROS 24, Jehan MARETTEAU: 133, Maryse MARTINEAU: 84. - Estas elektitaj kiel novaj komitatanoj: S-ino Y. CORVAISIER, S-ro R. BOUCHET, S-ro J. MARETTEAU.

Pri la tri pliaj komitatanoj (de 12 al 15) la venonta komitat-kunsido (komence de jaro 2000?) decidis novan, kompletigan elektadon, se denove mankas prezidanto kaj tial la ŝanĝo de la artikolo 11a (kolektiva direktado) iĝos validq. Ĉiukaze la Komitato plene rajtas alnomi interne aŭ ekstere teknikajn helpantojn.

VII- Diversaj demandoj: Sinpropono Christian LAVARENNE: Ch. Lavarenne vizitis la kastelon kun joko-kolegoj interesataj (13-VII-99). Ĉu luado por semajnfinoj je 6500 fr.? Poste, per longaj leteroj Ch. Lavarenne sin proponas, kiel konstanta helpanto kun la statuso CES (Contrat Emploi Solidarité) aŭ CEC (Contrat Emploi Consolidé). Li elnombras siajn studojn, diplomojn kaj kapablojn. - Opinioj diversaj. Financa risko. Duboj pri la persono... Ĉu provi unu jaron?; Ĉiukaze estas neniu laŭnorma loĝejo nuntempe. Finance neeble taŭgaranĝi laŭnorme lun ajn loĝejon. La A.K. tial respondu pri neebleco en la nunaj cirkonstancoj.

Memorlibro: M.T. Lloancy de pluraj jaroj kompiladas artikolojn kaj fotobildojn pri Greziliĵono kaj planas eldoni ĝin por la jubilea jaro (2002). Kiu financos? Ĉu kolektiva subskribo? Ĉu tio sufiĉos?

Kio pri la filmo? Kiu zorgu pri tio? D. Babin? Ch. Rivière? Ili ambaŭ estas ree komisiitaj. Se la restaŭrado de tiu filmo ne plu eblas, ĉu la 4000 fr. por tio rezervitaj povos esti transdonataj, kun la konsento de la donacintoj., al la eldonado de tiu Jubilea Memorlibro? La ĝenerala Asembleo konsentas.

Ĉar la tagordo estas elĉerpita la kunveno ĉesas je la 16a30.

La protokolinto: G. LAGRANGE




ĜOJAN  
KRISTNASKON!

FELIĈAN  
NOVJARON!

# GRAMATIKO PER BONHUMORO

La prepozicio " KROM " antaŭ iu vorto signifas, ke tiu vorto staras ekster la temo de nia parolo, ke ni rigardas ĝin kiel ion apartan ; tial ĝi povas havi egale bone la sencon de escepto kaj la sencon de aldonado, depende de la cirkonstancoj, en kiuj ĝi estas uzata. " KROM " per-si mem esprimas nek escepton, nek aldonon, ĝi esprimas nur apartigon ; sed ĉu tiu apartigo estas farata por ion forigi, aŭ kontraŭe, por ĝin pli akcenti, tion montras la senco de la frazo mem... Kompreneble la vorto " KROM " povas iufoje kaŭzi neprecizecon aŭ malkomprenigon ; sed en tiaj okazoj ni devas eviti la vorton " KROM " kaj uzi antaŭaŭ ĝi la pli precizajn esprimojn " esceptinte " aŭ " ne sole, sed ankaŭ ".

L.L. Zamenhof - Lingvaj Respondoj.



— Mi ŝatas ĉiujn sportojn, krom flugado.  
(Pli bone : esceptinte flugadon).



— Patrino estas tre ŝparema. Ŝi ĉiam pensas pri ĉiuj utiligoj de io ajn, krom pri la plej surprizaj !

(pli bone : ankaŭ pri la plej surprizaj)



— Ŝajnis al mi, ke ni forgesis ion. Ni pensis pri ĉio, krom la aŭtomobilo ! (la senso estas sufiĉe evidenta).